# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 8 Aŭgusto, 2014

*Kara Leganto, dekomence mi sincere volas bonvenigi hejmen nian estimatan s-ron prezidanton, d-ron Kordylewski: BONVENON!*


*Dum la pasinta monato okazis multaj gravaj eventoj, inter ili – UK en Bonaero. Pri ĉi tio ni pli detale parolos dum la aŭgusta kunsido, sed eĉ en ĉi numero vi trovos ion interesan. Ĉu vi atente legis julian n-ron? Se ne, bv tralegi ankoraŭ foje adiaŭan leteron de Krimeo. Hodiaŭ ni prezentas respondon de Ukrainio.*

*Antaŭ kelkaj monatoj nia prezidinto Humberto Perez transdonis al ni grandan keston kun…(informa bombo, vidu kaj klegu malsupre). Do, vi komprenas, ke ankaŭ ĉi numero ne estos enua por vi. Do, ek al la legado!* -La R.

## Arĥiva Informa Bombo

Antaŭ kelkaj monatoj nia prezidinto s-ro Humberto Perez transdonis al mi keston kun dokumentoj. Tio okazis dum la seriozaj eventoj en mia kara lando Ukrainio kaj mi iomete demetis dokumentaron (pardonu min pro la malatento). Sed evidentiĝis, ke revenis hejmen protokoloj de nia E-societaj kunsidoj de la plej unua kaj de sekvantaj 6 jaroj (1953-59). Do, mi oficiale konfirmas, ke la Esperanto-Societo de Ŝikago estis fondita la 13an de Novembro 1953 (vd la protokolon de la Unua Kunveno). Gratulojn, hodiaŭ nebulo de nia historio ekmalaperadas!

Pro tio mi proponas al nia estraro renovigi estrar-kunsidojn, kunveni je la 6:15 antaŭ la kutima monata kunsido, kaj starigi planojn por la fino de 2014 kaj 2015. Miaj proponoj estos dissendataj aparte. Vivu Esperanto en Ŝikago. *–V. Pajuk*



E S P E R A N T O - S O C I E T O D E Ĉ I K A G O:
Oficiala Filio de Esperanto-Asocio de Nord Ameriko

PROTOKOLO DE LA UNUA KUNVENO
la 13an de Novembro de 1953
ce: PROVINCIAL HOUSE
4841 South Woodlawn Avenue
Chicago, Illinois
Gastiganto: Pastro Gabrielo N. Pausback
Gastigantino: Fratino de Pastro Gabrielo

La kunveno komenciĝis je proksimume la oka kaj S-ro Hathaway petis ke Pastro Gabrielo estu la tradukisto. Tiam li legis la saluton*kaj la ĉarton,* kaj poste la membroj diskutis kaj aprobis la ĉarton. Ĉi tiuj membroj ĉeestis kaj voĉdonis:

Pastro Gabrielo Pausback
S-ro Roy E. Holland
S-ino Roy E. Holland
S-ro John A. Umurs
S-ro Nick Manoloff
Doktoro Takemaru Mikouchi
S-ro Allen Trubitt

(Ankaŭ ĉeestis amikino de Allen Trubitt)

Poste Pastro Gabrielo legis interesegan artikolon pri siaj travivaĵoj kaj la Esperanto-movado en Aŭstralio. Diskuto kaj demandoj sekvis. Tiam ni kantis la Esperanto-himnon, "La Espero," S-ro Holland ludanta la pianon.

S-ro Hathaway legis ilustritan artikolon pri la alfabeto de Esperanto, kaj Pastro Gabrielo tradukis.

Poste, ni ĝuis kafon, teon, kaj kuketojn, la fratino de Pastro Gabrielo gastiganta nin.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
* Troviĝos sur la sekvanta pago. Ĉiuj voĉdonis kunveni dufoje monate.

## UK de Esperanto 2014, Bonaero




En ekonomie nestabila Argentino estis fininta la 99-a Universala Kongreso de Esperanto. Informoj pri la UK ne estis abundaj, kiel kutime, eĉ la kongresa kuriero "Bonaera Voĉo" aperis regule, sed nur sur 2 paĝoj (mi povas konstati, ked dum la pasintaj 25 jaroj kuriero estis 4-paĝa, sed…). Sed, dum la argentina UK okazis sporta evento, kiun mi persone atendis dum multaj jaroj: piedpilkis E-teamo kun argentinaj armenoj, ĉu vi povas imagi tion? E-istoj malvenkis, sed mi ekmemoris, kiam en la fora jubilea 1987 jaro, partopreninte IJK en Krakovo (Pollando), mi mem ludis kontraŭ polaj gesamideanoj pro la teamo "Cetera Mondo". Ankaŭ ni tiam malvenkis, sed tradicio konserviĝas. Do, E-istoj, eklernu ludi ankaŭ perpiedoj. Denove – sukcesojn! *–Araneo*

## Respondo de Ukrainio al Krimeo *de Araneo*

"Kara Krimeo!

Sincere, min ĉagrenis via letero. Kaj hodiaŭ, mi pli klare komprenas, ke vi, Krimeo, estas la kutima Narciso.

Vi ial decidis, ke vi estas multe pli eksterodinara ol Ĉekarpatio aŭ Donbaso, Slobodio, Pokutio aŭ Polisio*. Vi postulis iun specialan amon, kiel kaprica bebo de multinfana patrino histerias kaj ĵaluzas siajn aliajn infanojn al aliaj gefratoj. Mi donacis mian amon al ĉiuj egale, mi amis kaj amas ĉiujn egale, kiel patrino fort-egale amas ĉiujn siajn infanojn.

Kiam oni fordonis vin de l' orfejo en 1954, vi estis dezerta, senakva kaj malbela bebo, forlasita de ĉiuj kaj bezonata al neniu. Dekomence oni perfidis vin en 1941, laŭ ordono de via duonpatrino, forpreninte armeon al Taman', kaj de via Sebastopolo malkuraĝe foriris Nigramara militŝiparo kaj kaŝis sin en Batumi ĝis la militfino. Poste oni forprenis de vi vian popolon, mortpafinte kaj deportinte por multaj jardekoj idojn de grandaj kaj fieraj Otomanaj caroj.

Kaj kvankam mi mem estis ruinigita, mi rekonstruis vin. Mi donis al vi mian dnipran** akvon por vi kulturi vitejojn kaj grejnkamparon, mi konstruis denove viajn urbojn kaj fervojojn. Mi revenigis vivon al viaj havenoj kaj plaĝoj, en via ĉielo enove ☞

ekzumis pasaĝeraj aviadiloj kaj ekfrapis vagonradoj. Kaj poste mi revenigis al vi vian popolon… Tiun popolon, kiu loĝis tie de la tempoj de la grizhara Bizanco.

Sed por vi ĉio mankis, vi postulis pli kaj pli da, ne pro malsato, sed pro la kaprico.

Pardonu, se mi per miaj nudpiedoj malpurigis tapiŝon de via beleco, sed sur ili estis grundo. Nia. Tiradis mian manon Donbaso, petante konstrui ŝaĥtojn, mi perpiede miksis cementon por DniproHESo***, mi fosis minejojn en Kirovohrado, veturigis lignaron de Stanislavivo, plugis grundon apud Poltavo, sed vi ja admiris la maron kaj akceptis viajn gefratojn sur litoj kun ret-metal-matraco kaj tolaĵo kun amsignoj de aliaj popoloj.

Mia bebo, vi ja estas nenifarulo! Vi, diablo prenu, eklernis fari nenion! Kaj kiam mankis kolbaso en viaj vendejoj, ĝi mankis en aliaj landpartoj miaj…

Vi postulis ekskluzivecon: mi konsentis kaj vi fariĝis respubliko. Kiel vi disponis pri tio? Ĉu vi aĉetis novajn litojn? Ne. Ĉu vi konstruis novajn banlokojn? Ne. Vi disdonacis vin al ĉiesulinoj, permesis forpreni viajn plaĝojn, malpurigadis la maron, vi ne eklernis produkti vinon kaj per via konjako oni povas nur venenigi koloradan (terpoman) skarabon.

Krimeo, vi ja estas nenifarulo. En viaj somerkafejoj laboras ne vi, sed miaj infanoj de la aliaj landpartoj kaj sultanidoj, denove akirantaj sian Patrujon. Vi simple komercis per la maro. Vi imagis, ke via ĉarmo metas vin super ceteruloj…

Kaj vi decides reveni al via orfejo.

Do, iru. Finfine, vi ja etsas mia duonfilo.

Sed mi ĝojas, ke inter miaj 25 infanoj nur vi ne trapasis ekzamenon por fideleco, kvankam ili malsatis ne malpli ol vi.

Kaj memoru nur solan: en via orfejo neniu kaj neniam demandos pri via opinio, ĝi estas plenŝtopita per al-vi-similaj narcisoj. Kaj povas esti, iam, kiam vi subite plisaĝiĝos, vi ekkomprenos multcentjaran veraĵon, ke vera patrino estas ne tiu, kiu naskis, sed tiu, kiu kreskigis.

Sed mi jam estos fore.
Adiaŭ.
Protektu vin Jesuo kaj Alaho.
Via Ukrainio".

* Etno-historiaj regionoj de Ukrainio
** Nord-Krimea kanalo (unua linio konstruita en 1957-1963) transportas dnipran akvon al Krimeo
*** DniproHESo – Dnipra hidraelektra stacio

## Adreso:


Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org


## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Aŭgusto – Impresoj de la somero (raportos dezirantoj)
La Adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago
23an de Septembro – Temo estos anoncata
La Adreso: La Sulzer Biblioteko

# NASK 2014: Ankoraŭ Kresko




La unuan fojon en sia pli ol 40 jaroj da ekzisto, NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto) paŝis trans la landlimon de Usono… kaj sukcesis allogi 63 studentojn el ok landoj – la plej granda partoprenantaro ekde la 1980-aj jaroj! Tiu ĉi sukceso daŭrigis la pasintjaran ten-dencon, kiam 43 studentoj partoprenis – tiam la plej granda nombro jam de jaroj.

Al kio atribui tiun kreskon? Certe, multaj faktoroj kontribuis, inter kiuj: allogeco de la la gastigurbo (Viktorio, Brita Kolumbio, Kanado), pli efika informado inter uzantoj de lernu.net, elstara instruista teamo, kaj ĝenerale pli vasta diskoniĝo de la NASK-fenomeno, danke al artikoloj, videoj kaj rekomendoj de iamaj NASK-studentoj. Ni ĉe ESF ŝatus kapti ĉi tiun okazon ankaŭ por saluti vin okaze de la datreveno de Esperanto – feliĉan Esperanto-tagon!

Ĉu vi subtenas altnivelajn Esperanto-instruprogramojn kiel NASK, kaj deziras ke NASK kresku kaj pluampleksiĝu? Se jes, bv. subteni NASK-on per "donaco al ESF", partoprenu en estonta NASK kaj/aŭ rekomendu NASK-on al viaj amikoj kaj samgrupanoj!

# *Ho, Kolombino! (La Paloma)*

*Muziko de Sebastian Iradier (1809-jare). La unua, popola teksto aperis en 1850-jaroj. Vidu sube. «Interpretada en diversas culturas» (hisp.) (Interpretita en diversaj kulturoj). Jen vario en E-to de nia senlaca s-no Gregory S. Dolgin (Usono, 2014):*

En hor', kiam el Havano mi strebis for,
Divenis nur Vi pri mia sopir-angor'.
Al Sun' leviĝanta flugis bel-kolombin'
Kaj Vi ĉe disiĝ' konfesis: «Mi amas Vin.

Kie navigus, ĉie ĉe ajn insulo
Voku kaj mi rapidos al Vi, karulo.
Se eĉ renkonta vent' tiam forte blovos,
Velon de via ŝip' mi rekonos, trovos».

Ho, birdet-kolombin',
Ankaŭ mi amas Vin.
Reveninte al Kubo kaj al Havano,
Iĝos Vi fianĉin'.

En hor', kiam en Havan' kantis via kor',
Divenis nur Vi pri mia alvok-amor'.
Al Sun' leviĝanta flugis bel-kolombin',
Kaj ni por la nupt' ripetis: «Mi amas Vin!»

Kie navigus, ĉie ĉe ajn insulo
Voku kal mi rapidos al Vi, karulo.
Se eĉ renkonta vent' tiam forte blovos,
Velon de via ŝip' mi rekonos, trovos!»

*Ho, feliĉ-kolombin'...*